

エスペラントは心の国境を消すことばです

Organo de Hokkajda Esperanto-Ligo

Heroldo de HEL

N-ro 158

Marto 2015

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

[Enhavo/目次]

- ・ 表紙、Enhavo/目次 P. 1
- ・ **Japanie, ekologie (el organo de UEA)** P. 2
- ・ **“Reviviĝu, la arbaro de Erimo!” sur organo de UEA** P.3
「よみがえれ、えりもの森」が UEA 機関誌に
/HOŜIDA Acuŝi
- ・ **La unuafoja eksterlanda vojaĝo! (3) /Skribita de OMO** P. 4
- ・ **LA GEOPARKO LAGO Tôya kaj Monto Usu (3)** P. 9
洞爺湖有珠山ジオパーク (3) /Sawaya Yûiti
- ・ **Danke ricevitaj** P.12
- ・ **La 6-a Internacia Esperanto-Festivalo** P.14
en Zaozhuang/Sawaya Yûiti
- ・ **Protokolo de la 3-a Komitata Kunsido de HEL/Kasjaro 2015** P.15
2015 年度 第 3 回北海道エスペラント連盟委員会 議事録
- ・ [編集後記/Redaktanto parolas] P.16

Japanie, ekologie

■ Manfred Westermayer

Reviviĝu, la arbaro de Erimo! temas pri bonege prezentita raporto pri homkaŭzita mediokatastrofo kaj feliĉe ankaŭ pri ĝia longdaŭra riparo. Belaj natur-impressionismaj pentraĵoj de TAKADA Saburoo donas la enhavan fonon kaj substrekas la rakonton de fiŝistoj, kiuj revivigis arbaron dum la tempodaŭro de kvindek jaroj sur marbordo de Erimo, estiĝinta dezerto kovrita de sablo.

La originalan tekston de MOTOKI Yokoo tradukis kvin japanaj esperantistoj en klaran lingvaĵon, kaj eldonis ĝin Japania Esperanto-Instituto sur fortika glata papero en formato iomete pli granda ol A5.

Erimo troviĝas sur la suda montara kabo de Hokajdo, norde de Honŝu. Sufiĉe detala mapo montras la geografion kaj donas la japanajn lokonomojn kune kun la esperantigitaj. Praarbaro kovris tiun distrikton, kaj en la maro kreskis laminario (nomo de long-folia mar-herbo). La densa arbaro donis foliojn por iomete nutri la maron, kaj samtempe tenis la grundon tiel ke la maro estis tute pura kaj klara.

Fine de la 19-a jarcento ekloĝis tie fiŝistoj por rikolti kaj laminariojn kaj fiŝojn. Pro la malvarma klimato ili uzis la arbolignon kiel hejtajon. Post pluraj jaroj la arbaro estis for, la pluvo forfluigis la fekundan grundon kaj la vento blavis ĝin en la maron. Tiu ĉi poluado malpurigis la laminaron kaj eĉ malhelpis ĝian kreskadon sur la nuda roka surfaco. Sur mapo de la jaro 1911 tiu regiono nomiĝis "Erimo-dezerto". La fiŝistoj estis ĝenataj ne nur de la fortaj sablo-ŝtormoj tie, sed ankaŭ de la malboniĝinta kvalito de la koto-kovrita laminario kaj de la manko de fiŝoj. Tial ili pripensis forlasi tiun regionon. Cuneo, la heroo de la rakonto, ekrimarkis la kaŭzon de la katastrofo, kaj solvo estus replanti arbaron. Sed la bona grundo jam estis for kaj fortaj ventegoj malhelpis eĉ la ek-kreskon de gresoj, ĝis la homoj trovis la rimedon forŝiri la venton. Sed la plantitaj arbedoj ne povis kreski pro la (sala) akvo



Reviviĝu, la arbaro de Erimo!

Motoki Yokoo. Ilustris Takada Saburoo. El la japana trad. div. Tōkyō: JEI, 2012. 32p. 24p. Koloriluz. ISBN 9784888870733. Prezo: € 10,80.

Japania-Esperanta terminaro pri naturmediaj problemoj.

La Grupo NUN-Vortoj, Tōkyō: JEI, 2012. 44p. 21cm. ISBN 9784888870740. Prezo: € 3,30

sub la sabla surfaco, tial necesis dreni la kamon.

Post multjara agado ek-kreskis pioniraj pinoj, kaj protektate de la pinoj kreskis poste denove la praaj mongolaj kverkoj kaj eĉ revenis cervoj. Tamen la enmaraj rokoj restis kovritaj de grunda koto. Maljuna fiŝisto rememoris ke nur profunda glaciĝo de la maro povus purigi ĝin, kaj feliĉe post kelkaj jaroj okazis la necesa glacio-purigado de la rokoj kaj marfundo. Tiam revenis la laminarioj kaj dank' al ilia protekto revenis ankaŭ la fiŝoj. Tia regajno de la bona stato

daŭris kvindek jarojn, kaj la fiŝistoj ankoraŭ en la jaro 2003 plantis arbedojn.

La verkisto kundigas tiun rakonton kun la senarbarigo en aliaj mondoregionoj, kie la malbona sekvo montriĝas eble ne tiom rapide. La loĝantoj de Erimo instruas la homaron kiel penega estas la klopodo reakiri naturon unufoje perditan.

Restas rimarkigi, ke la teksto estas en sufiĉe grandaj literoj, ke la lingvaĵo estas bone legebla kaj tial taŭgas kiel emocio instiga teksto ankaŭ por progresantoj. La pentraĵoj tre saĝe subtenas la komprenadon, eĉ se ne ĉiuj vortoj en Esperanto estas konataj.

Japania-Esperanta terminaro pri naturmediaj problemoj estas konciza, modestaspekta vortareto, kompilita de la Grupo NUN-Vortoj, kiu prezentas ĉirkaŭ 2 000 kapvortojn el la sfero de naturmedio, politiko, sano, maro-kaj agrokulturo, turismo kaj industrio. Ĝi celas ĉefe homojn kiuj parolas la japanan kaj povas legi *Hiragana kaj Kanji*. Dank' al japana esperantistino mi komprenis pli bone la ordigo-principon. La terminaro komenciĝas per listo de ĉ. 22 tutmonde uzataj mallongigoj, ekz. COP, DDT, PCB kaj REACH, kiuj estas klarigitaj japane kaj tradukitaj en Esperanton. Poste sekvas 10 ĉapitroj ordigitaj laŭ *Hiragana*: komenco per vokaloj, kaj la 9 ĉefaj konsonantoj (k, s, t, n, h, m, y, r, w). Mia amikino klarigis al mi, ke kelkaj tutmonde uzataj esprimoj estas transliterumitaj el la angla en la japanan kaj enkrampe klarigitaj en la japana, ekz. *car-sharing* = kundivido de aŭto, komuna aŭtoluado. Jam por germanoj kiuj ne parolas la anglan, tiaj terminoj sonas strange, des pli certe por japanoj kiuj ne parolas la anglan; do, la klarigo en la japana helpas kompreni pri kio temas. En la aldono ĝi prezentas unue koncizan glosaron pri ekologio, pluoŭ kaj politikaj niveloj de respondeco; kaj due en la fontindikoj kelkajn valorajn ret-ligojn al Esperanto-organizo, kaj krome literaturon: *Plano B, Ekoturisma Vortaro, Fiziko-geografia terminaro*, japanajn vortarojn kaj generalajn gazetojn kiel *Monato* kaj *Kontakto*, en kiuj oni ofte publikigas pri naturmediaj problemoj. Kelkaj nocioj aperas sub diversaj kapvortoj aŭ estas diversmaniere kunmetitaj laŭ la diversista lingvouzo. La terminoj estas tute aktualaj kaj la libreto, pro sia ampleksa kunmeto, estas valora ankaŭ por ne-japan-lingvanoj, sed certe neprope por japanoj kiuj engaĝiĝas pri aktualaj mondo-problemoj.

“Revivi ĝu, la arbaro de Erimo!” sur organo de UEA
「よみがえれ、えりもの森」が UEA 機関誌に

HOŝIDA Acu ŝi

左の頁(2頁)の記事はUEA機関誌 esperanto (Februaro 2015)に出た記事です。Heroldo de HELに入るように縮めたので読みにくくなりました。a ĝuloj は虫メガネが要りそうです。

筆者の S-ro Manfred Westermayer は環境保護団体 AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj) のリーダーで2007年の横浜 UK(第92回世界大会)のAVE分科会に私が出席してこの本の説明をしたのがことの始まりでした。

彼はこの本をエスペラント訳したわれわれの意図に大いに共感し、AVEのホームページで紹介してくれました。当時は日本語の絵本にエスペラントの訳文を挟み込んで読んでもらったのですが。その5年後札幌での第99回日本エスペラント大会。この本のエスペラント版が記念出版されました。

大会の後で「こんな本になりました」と彼に送ったのですが「すばらしい!」と喜んでくれただけでなく、さらにこんな紹介文まで出してくれるとは Vere surpriza danko! でした。
小さい字は読みにくそうだし 要旨を説明します。

この本では人間によって一度こわされた自然環境が長年の努力によって回復されていく歴史を画家・高田三郎の美しい印象的な絵で描いている。本木洋子による日本語原文は5人のエスペランチストによって明晰なエスペラント文に訳され日本エスペラント協会が発行した・・・

北海道南部のえりも岬周辺はかつては太古の森におおわれており、海は魚と昆布の宝庫だった・・・19世紀の終わりごろ昆布とりの漁師が住み着き森を伐採し半世紀で森がなくなるとえりも砂漠と呼ばれる荒廃地になり昆布も魚もとれなくなった…

と、これまでの歴史を解説。

最後に原作者本木洋子さんの言葉を引用して、


「一度失った自然を取りかえすことが、どんなに大変なことか、えりもの人たちは全人類に教えてくれた」とむすんでいます。

La unuafoja eksterlanda voja ĝo! (3)

Skribita de OMO

• Pri vespermanĝo de hotelo:

Ĉi dekstra bildo estas ordinara ĉef-plado de vespermanĝo de Azadi Grand Hotel en Tehran. Antaŭ ĉi tiu plado ni povas manĝi bufedo-stilan salaton, en kiu ĝenerale troviĝas tomato, kukumo, karoto kaj brasiko. Irananoj manĝas ĝin multege kiel monton sur plado.



La dekstraj manĝaĵoj de la bildo estas frititaj fiŝoj, super la fiŝoj zukinio - zucchini - plenigita per viando, meze spagetoj kaj maldekstre omuleto kun multegaj diversaj aromaj vegetaĵoj. La sento manĝinta tiun ĉi omleton estas kiel seka kaj kvazaŭ mi manĝus sekigitan sovaĝan herbon. Mi ne sentas la guston de ovo, kvankam la samgrupanino ŝatas ĝin. Ĉu vere !?

• Pri problemo de la aviadilo:

Ĉirkaŭ la duono de la plano pasis. Fine la sopire atendatan urbon Isfahan ni vizitu! Je la oka vespere el flughaveno de la urbo Ŝiraz ni flugos al la urbo Isfahan, tiel ni planis. Post kiam ni eniris en la planitan aviadilon, ĝi tamen nenial ekflugas. Pasis ĉirkaŭ tridek minutoj, kiam ni ne povas atendi senpacience, la stevardinoj komencis disdoni plietmanĝojn al la pasaĝeroj sen ia anonco. Havinte nenia rimedo, ni sole finmanĝis ĝin. Kaj pasis kelk-dek minutoj sen anonco. Abrupte anonco de la ĉefpiloto komenciĝis, ke tiu ĉi aviadilo estas neordinara kaj restu ĉiuj en la atendejo de la haveno, ĝis kiam la

aviadilo estos fin-riparita. Do ni devis resti en la atendejo pli ol unu horon. Laŭ nia akompananto, se oni ne povus ripari, ni devus uzi buson. Tiakaze ni malŝparus tempon ĉirkaŭ ok horojn. Do ni alvenos al hotelo en la urbo Isfahan en la tagiĝo. Tre severe! — Post kelka tempo estis anonco, ke stabo finriparis ĝin kaj eniru ĉiuj la aviadilon. Poste ni sciiĝis interne la kazon, kio estis kredo de pneŭon! Ne kredeble! Ni apenaŭ atingis al la urbo Isfahan kvar horojn pli malfrue ol la planita tempo, nome je la noktomezo!!

• Pri la duono de la mondo:

En Imam Parko mia edzino ial alparolas senĝene irananojn pasantajn aŭ ripozantajn sur gazono. Devas esti, ke ŝi ne povas paroli anglan lingvon nek iranane. Poste mi demandis ŝin, kio okazis. Ŝi rakontis, ke ofte diratan, fame konatan frazon ŝi alparolis ilin kaj ricevis afablajn salutojn kaj ridetojn sur la tuta vizaĝo. Tio estas "Isfahan Nesf-e ĵahaan!", esperante "Isfahan, La duono de la mondo". Memori la vortojn estas tre malfacile. Venis ideo al ŝi, ke ŝi rememoras japanajn vortojn "NESCAFE JAPAN". Brila ideo!


En dek-sesa jarcento la granda reĝo Abbaas konstruis metropolon ĉi tie, Isfahan, kaj en la dek-sepa jarcento vizitadis multe da komercistoj aŭ diplomataroj, de kiuj la frazo estis admire donita al Isfahan ekde tiu tempo.

• Pri acida memordolĉaĵo:

Jam venis la tempo forlasi IRANOn. Atendante la aviadilon, ni ripozis en la atendejo de flughaveno en Tehran. Mia edzino trovis vendejon, kie oni vendas tubformajn dolĉaĵojn faritajn el fruktopasto, ekzemple granato. Tion ŝi informis al la samgrupanoj. ili samtempe iris la vendejon por aĉeti. Mi ne iris, ĉar mi jam ne havis

monerojn kaj demandis iun grupanon, kiom ĝi kostas. La respondo estis 50,000 rial, nome 2 dollars por du. Tion aŭdinte, mia edzino tre bedaŭris. Kiam ni trapasis la pordon por sekureca kontrolo, mi trovis vendejon por senimposta ĵojn. Tie troviĝis tiuj dolĉaĵoj. Kun la akompananto mi negocis pri tiu dolĉaĵo. Sed ankaŭ la vendisto ne bone parolas la anglan. Li diras unu dolaron. Por du?, ni demandas. Kvankam li insistis du, tri fojojn, fine li cedis kaj mi pagis unu dolaron por du dolĉaĵoj. Nur duonon kontraŭ grupanoj!

Iom pasis de kiam ni revenis hejmen kaj ni malfermis pakaĵon de dolĉaĵoj, kiu estis formita kiel formo de japana sekmarlaktuko kaj volvita. Deŝirinte ĝin, mi prove manĝis peceton. Iom dolĉa sed ve tre acida! La gusto ŝajne estas kiel kuire densigita suko el peklita umeo, kiun mi prenis por medikamento en la infaneco. Poste mi konstipiĝis. Sed mia edzino formanĝis ĝin kaj ŝi estas tute sana sen ia simptomo.



• Pri necesejo denove:

Preskaŭ ĉiuj necesejoj estas japanstilaj, nome oni povas uzi ilin kaŭrante, ne sidante sur la tenilon por la postaĵo kiel eŭropstila necesejo. Kvankam en hotelo ekipita estas eŭropstila meblo, tamen por mi la japanstila estas prefere pli facile uzebla, ĉar kiam mi uzas ĝin, mi devas teni kaŭ ĉukan tubon en la dekstra mano kaj lavi min per la maldekstra mano kaj do la spaco sub la postaĵo necesas. Kaj mi devas ne forĵeti klozetpaperon en la trueton. Se mi erare forĵetos ĝin, certe akvo superfluos sur la plankon. Aĥ, Dio permesu min!

- Pri almozujo/kvestkesto:

En grandaj urboj, kiel Tehran aŭ Ŝiraz mi trovis sur stratoj ŝajne poŝtokestojn bluajn kiel tiujn, kiuj troviĝas sur antaŭĝardeno de domo ordinara en usono. Mi demandis nian ĉiĉeronon, kio estas tio. La respondo estis almozujo/kvestkesto, en kiu urbanoj enmetas monon por kvesti. Por islamanoj kvesto estas unu el kvin devigataj agoj. Reale papermonoj estas videblaj en la kvestoj, apud kiuj multaj homoj preterpasas. Mi timas, ĉu la kvestaĵoj estus perforte rabitaj, se en Japanio.

- Pri vojtrafiko:

En la grandaj urboj kiel Tehran aŭ Isfahan, troviĝas rotaciaj krucovoj kiel en la urbo Asahikaŭa. Nature ne troviĝas signaloj ĉe tiuj vojplacoj. Tutnature stagnado de trafiko okazas. De la dekstra flanko aŭ de la maldekstra la nazon de aŭtoj ĉiuj enpuŝas antaŭ nian buson. Do la irado de nia buso estas po kelkdek centimetroj kiel testudo. Ĉirkaŭrigardante, ni trovis la vojplacon plenplena de aŭtoj. Ni timis, ke ni ne povus eliri el ĉi tiu loko. Sed kvazaŭnenia problemo okazus, la buso glate eliris, kvankam la tempo planita jam pasis.

Ĉe aliaj vojoj ni fojfoje vidis, ke pasantoj ĉiuj senĝene trapasas aŭtovojon ĉe lokoj sen zebrostria pasejo malgraŭ ke multaj aŭtoj rapide veturas. Tio estas tiel tre lerta, ke ni ne povus simile trapasi. Ni tamen trovis, ke ĉiuj aŭtoj havas vundojn sur ĉiuj flankoj de autoj, kaj ni vidis kverelojn apud akcidentaj autoj du fojojn dum la restado en IRANO.

Tiaj akcidentoj povas okazi, ni ial kontente konvinkiĝis.

- Pri kulturo ne-viciĝi:

Ni spertis la okazintaĵon ne-viciĝi, kiam ni eniris en IRANO. Sed tio estis pro Irakanoj. Bedaŭrinde, ni tamen renkontis similajn okazintaĵojn fare de Irananoj. Kiam ni

atendas la pordon malfermiĝi ĉe la kontrol-enirejo de la enlanda aviadilo por Yazdo, al ni alproksimiĝis Iranino tre svelta, tre bela kun ĉadoro. Dum ni senkonscie rigardis ŝin, ŝi enpuŝis sin en nian viclinion, la unuan vicon, kaj plie ŝajne ŝiajn familiojn kun maljunulino. Kaj ili unuavice eniris la internon de la aviadilo.

Aliaokaze, ĉe la tombejo de mondfame konata poeto Hafiz post la klarigo de la poeto mi kaj mia edzino intencas promeni la ĉirkaŭaĵon ĝis la ekiro dum iomete da tempo. Antaŭe ni iru necesejon. Kaj poste mi atendis ŝin ĉirkaŭ la elirejo. Kvankam pasis 15 minutoj, ŝi ne aperis. Fine 20 minutojn poste ŝi revenis. Kio okazis al ŝi?, mi demandis. La respondo estis, ke virinoj aŭ virinetoj enpuŝis sin unuj post aliaj antaŭ ŝin kaj ŝi povis fari nenian agon. Kaj ankaŭ ĉi tie ni konvinkiĝis, ke ni nun estas ne en JAPANIO.

Lastatempe ni vidis TV-programon pri HINDIO. Kaj en tiu programo hindoj vicstaris longe kaj ili ĉiu prenis ial la brakon de la persono en sia fronto en vico. La kialo estis por eviti interpuŝiĝon, klarigis la program-ĉiĉerono. Bonega ideo !!

• Fino:

Mi forĝesis, kie tio okazis. Ŝajne en flughaveno de Tehran ĉirkaŭ vespera krepusko ni atingis la havenon, kiam ni adiaŭos IRANOn morgaŭ. Por preni buson ni piediris en la antaŭplaco, tirante pezan valizon. Tutnature la placo estis plenplena de homoj kaj aŭtoj en stagnado. Kaj kiam ni kudre iris inter aŭtoj, nia ĉiĉerono rimarkis, ke unu el stirantoj estas fama Irana piedpilkisto kaj ni ĉiuj svingis la manojn salute al li. Ankaŭ li rimarkis tion kaj malfermante fenestron de la aŭto li svingis la manon afable!

Ĉu tia okazus en JAPANIO?!

Li omaĝe malfermis fenestron afable! Kiel familiara!

(Fino)

LA GEOPARKO LAGO Tôya kaj Monto Usu (3)

洞爺湖有珠山ジオパーク(3)

Sawaya Yûiti

(Noto de la redaktanto)

前号からの続きです。内容は次の通り

- 3 昭和西山誕生
- 4 1977-78年有珠山噴火

3. Naskiĝo de Syôwasinzan (Nova Monto Syôwa)

En 1943-1945, ĝuste fine de la azia-pacifika milito, okazis erupcioj en la piedo de Monto Usu. La erupcioj kun piroklasta surĝo kaj diastrofismo naskis Novan Monton Syôwa. La erupcioj okazis en tritika kampo. La formiĝo de Syôwasinzan pro la erupcioj estis detale kaj precize observitaj de s-ro Mimatu Masao (1888-1977), tiama estro de la poŝtoŝeĵo Sôbetu. Lia konstanta observado de la diastrofismo el la fiksita observa punkto fruktiĝis kiel "la diagramo de Mimatu", kiu detale kaj konkrete registris la formiĝadon de Syôwasinzan. La nova vulkano estas unika, ĉar ĝi estas posedaĵo de individuo. Post la naskiĝo de la nova vulkano, s-ro Mimatu Masao aĉetis la terenojn de la eksa tritika kampo. Kvin kamparanoj posedantaj la tritikan kampon volonte vendis la terenon al li, ĉar la kampo fariĝis la vulkano kaj jam ne taŭgas por agrikulturo. S-ro Mimatu rekonis la valoron de la nova vulkano kaj havis fortan volon konservi ĝin, kiel ĝi estas. ĉar tiam diversaj homoj venis al la nove naskita vulkano por preni sulfuron el la vulkano, kolektis vulkanajn rokpecojn por ekzameni, ĉu ili enhavas metalojn ktp. Komence li klopodis por ke la ŝtato aĉetu la terenojn por helpi al la kamparanoj kaj por konservi la naturan medion, sed estis tuj post la milito, mankis mono al la ŝtato kaj la vilaĝo. Finfine li decidis, ke li men aĉetu la terenon por konservi la novan vulkanon. Ĉiuj parencoj kontraŭis lian ideon. kaj miris lian konduton aĉeti jam senvaloran

vulkanon kun vulkanaj rokoj sen verdaĵoj, sen esperebla rikolto.

La vulkano havas formon de renverista malgranda bovlo sur renversita granda bovlo. Unue la parto en la formo de granda renversita bovlo nomata Tegmenta Monto estis formita de elstariĝo de lafa kupolo, kaj de sur la granda lafa kupolo alia lafa kupolo elstariĝis. Tiu formo estas bone vidata en la flanko de la urbeto Sôbetu. Mi naskiĝis en Sobetu, do laŭ mia estetiko tiu formo estas plej eleganta aspekto de Syôwasinzan. Nun la tegmenta monto estas kovrita de densa arbaro, sed komence Syôwasinzan havis neniun verdaĵon sur si. Ĝi estis nuda nur kun brunaj vulkanaj rokoj. En la montpiedo kuŝis multaj grandaj vulkanaj rokoj. Mi vidis la vulkanon de proksime ĉiutage ĝis nia familio translokiĝis al la najbara urbo Date en 1955. Nokte vidiĝis ruĝaj lumpunktoj sur la supra lafa kupolo.

Ĉu vi scias, ke ankaŭ Tezuka Osam faris bildrakonton pri Syôwasinzan kun la titolo "Fajra Monto". S-ro Mimatu Masao ne estas la heroo de la bildrakonto, ĉar li estis tre serioza persono kaj estis malfacile eĉ por Tezuka, ke tia serioza persono disvolvu bildrakonton kiel la heroo. Li ne taŭgas por heroo de la bildrakonto, do Tezuka kreis simpl-animan drinkeman, sed amindan junulon, kiu multe respektas s-ron Mimatu, kiel la rolanto por disvolvi la rakonton. El la vidpunkto de tiu ĉi junulo Tezuka Osamu verkis bildorakonton pri Mimatu Masao kaj Syôwasinzan.

Kvankam Monto Usu kaj Syôwasinzan estas geografie apartaj montoj, tamen estas notinde, ke geologie Syôwasinzan estas parto de la vulkana Monto Usu, ĉar la magmo sub Monto Usu faras erupciojn foje sur la kratera planko, foje en la montpiedo, kaj kiel vulkano la tuto de Ô-usu, Nova Monto Usu, Ko-usu k.a. inklude Novan Monton Syôwa formas Monton Usu.

Estas multaj vulkanoj, kiuj havas eblecon erupcii ne nur sur la montsupro sed ankaŭ en la montpiedo. Ekzemple, en la piedo de Monto Huzi okazis erupcio en 864, kaj ĝi faris la lafan kampon Aokigahara.

4. Erupcioj de Monto Usu en 1977-78

Vi povas supreniri sur la monton Usu per telfero kaj ĝui belan panoramon de la Syôwasinzan, la lago Tôya kaj la golfo Utiura.

Tie vi povas vidi la kraterojn faritajn de la erupcioj de 1977-1978.

La erupcioj multe ŝanĝis la figuron de Monto Usu.

Antaŭ la erupcioj de 1977-1978, la figuro de Monto Usu estis unika kaj multe pli gracia ol la nuna. Ĝis marto de 1955 mi loĝis en tiama vilaĝo Sôbetu kaj ĉiutage vidis Monton Usu kaj Novan Monton Syôwa. Laŭ mia estetika koncepto la nuna figuro de Monto Usu estas malbela aŭ senakcenta ordinara monto.

La vulkana kratero Ginnuma

La grandaj erupcioj en 1977 naskis Novan Monton Usu (Usu-sinzan). Estis neniu viktimo de la erupcioj. Kotfluo kaŭzis tri perdintojn. La erupcioj sinsekve okazis en la montsupra parto. Antaŭ la erupcioj estis vulkana lago nomata 'Arĝenta Lago' aŭ 'Ginnuma'. Ĝin ĉirkaŭis densa arbaro. La lago estis restejo por migrobirdoj. Oni ekskursis al Ginnuma. De aŭgusto de 1977 ĝis oktobro de 1978 ripetadis erupcioj ĉirkaŭ la lago kaj la sinsekve naskintaj krateroj kuniĝis kaj fine formis la nunan krateron Ginnuma. Tion kaŭzis, ke magmo en alta temperaturo tuŝis akvon de la interno de la vulkana korpo kaj 'akva-vapora eksplodo' ripete okazis. La fumoj estis elŝprucitaj nur kelkcent metrojn supren de la kratero, kaj el la fumo abundo da vulkanaj rokoj, sablo kaj cindro disfalis sur la tersurfacon kaj disfluis en ĉiujn direktojn kvazaŭ sabloŝtormo kaj sedinentiĝis sur la kratera planko. Ĉi tia fenomeno estas nomata 'piroklasta surĝo'. Mult-stria figuro sur la supra parto de la vulkana kratero Ginnuma estis formita de ripete okazintaj pirokrastaj surĝoj kaj amase falinta vulkana cindro, kaj la iama densa arbaro kaj la lago estingiĝis. Poste en la kratera planko ofte disfalis internaj muroj de la ĉirkaŭkratera montaro kaj ofte disfalis ruboj de la montoj Malgranda Usu, Ogari, Granda Usu kaj Nova Monto Usu, kaj okazis oftaj kotŝtonaj fluoj en eta skalo pro pluvo.

Nun 30 kelkajn jarojn post la erupcioj, en la kratera planko de la suda piedo ĝis la okcidenta piedo de Monto Malgranda Usu, poploj, betuloj kaj alnoj kreskas pli ol 10 metrojn altaj kaj tie disvastiĝis zono de densaj sovaĝherboj.

La kratero I

De post novembro de 1977, sinsekvaj erupcioj naskis novan vulkanan

(Daŭrige sur p. 13 ; 13A-3A-7A<)

* La Suno Pacifika N-ro 331/
332 2014年8・9月合併号、TEK(東京エスペラントクラブ)発行。B5X20
頁のうちE(エスペラント)文は1頁は
Argenta Kunsido en aŭgusto/
IGARASHI Takeo。「第100回世界
E(エスペラント)大会に参加しよう/編
集部」、つづいて「高齢化社会—高
齢化のモデル」、「Eの散歩道」、「20
14年9月 Ora Kunsido」の筆者は
大庭篤夫。

* La Suno Pacifika N-ro 333 2
014年10月号、TEK発行、B5X16
頁のうちE文4頁は Andrej Grze-
bowski の死去関連記事。日本語
記事:「TEK ザメンホフ祭/編集部」、
「2014年11月 Ora Kunsido/大庭
篤夫」、「小浜市の日本大会/五十
嵐岳男」、「2014年9月の Ora Kun-
sido/山口喜代子」。

* Novaj^oj Tamtamas; n-ro 300/j
anuario 2015, Internacia Gaz-eto
de Jokohama Esperanto-
Rondo(JER, Hama-Rondo)A4X8 頁、
エスペラント文。300号記念(Jen
n-ro 300!)の赤文字入り、カラー印刷。
La Jar-kajero de Jokohama
Esperanto-Rondo は2013年10月
から2014年末までの活動報告。
ウクライナの Tatyana Auderskaya
の VASILIJ EROŠENKO-JAPANA
POETO は連載3回目。BILDO-
ESEJOJ は小笠原への船旅と箱根
の屋外美術館訪問記事、全ページ
にカラー写真多数。

* La Tamtamo; 第472号、2015年
1月号、横浜エスペラント会(JER)発
行。A4X8 頁、日本語。よこはま国際
フォーラム 2015(2月)への参加計画、
神奈川県ザメンホフ祭(12月)報告、
講習会便り(6クラス)、読書会報告
は Pri hohomoj kaj verkoj につい

て。

* Mejl's^tono 2015 januaro, n-ro 247,
仙台エスペラント会、B5X14 頁のうち E
文4頁は巻頭言(GOTOO Hitosi, prez-
ididanto)とザメンホフ祭(総会)報告。

* 受講生通信; 第158号、2015-2-01
沼津エスペラント会、B5X12 頁頁の
うちエスペラント文1頁半。いつも
ながら通信講座の受講生と添添削
者(S-ro 藤巻謙一)の問答が面白い
が、この頃残念ながら北海道から
の参加者見えず。

* La Movado:関西エスペラント連盟
(KLEG)発行、N-ro768, Februaro
2014, B5x20 頁のうちE.文4頁。巻
頭記事は3ページにわたる「追悼:タ
ニヒロユキさん」。モバード俳壇は連
載43回目、7人から19句の投稿、
うち九句が紙面に出ている。「各地
でザメンホフ祭」には11の地方会か
ら記事と写真。

* NOVA VOJO :N-ro 514 febru-
aro 2015, EPA(エスペラント普及
会)、A5X34 頁のうちE.文9頁。巻頭
言「年の初めの私の『夢』/齊藤泰」
の最後にある昨年亀岡のザメンホフ
祭で全員暗唱した言葉、個人だけで
なく運動全体についても考えるべき
内容。「UKの100年—ちよっと小路
へ(2)」は第1回UK、当時の日本と
ヨーロッパとの関係、当時のフランス
第3共和制の歴史など内容豊富。
連載中の RAKONTOJ EL OOMO-
TO(大本物語)はドブジンスキー氏に
よる面白い日本文化紹介になっている。

* La Informilo de NEC/センター
通信・第275号、2015年2月10日
名古屋エスペラントセンター(NEC)
発行、B5X10 頁のうちE文2頁
1~2頁はザメンホフ祭の記事と写真。
NI LEGU(読書会報告)、「ああ、イタ

リアの風よ」はイタリア在住の *artista*」と協力しての東日本震災被災者支援活動の報告(堀泰雄)など。

「センター新会員・清水美穂さんの自己紹介」は小学生の時読んだ本でザメンホフを知って以来のエスペラントとのかかわり、元ユーゴスラビア、Spomenka Štimec のことなど。

“Suga Atsuko kaj Perugia/Ito Tosihiko”はイタリア文学者・須賀敦子(1929-1998)と彼女の学んだイタリアの大学などについて。

* *Novaj^oj Tamtamas*; n-ro 301/februaro 2015, *Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo* (JER, Hama-Rondo)A4X4 頁、エスペラント文。前号(300号)に対して *Zdravla/Kanado* と *Mirejo*(*sviso En Benino*)から祝辞。97a *Legokunsido*(読書会報告)は“*Pri homoj kaj verkoj*”について。

* *La Tamtamo*; 第473号、2015年2月、横浜エスペラント会(JER)発行。A4X10 頁、日本文。1月25日の総会(NPO 法人申請中のため横浜エス

ペラント会としては最後)の報告など
* *La Movado*:関西エスペラント連盟(KLEG)発行、N-ro769, marto 2015, B5x16 頁のうち E.文 6 頁半。巻頭記事 *Skize pri nia Esperanto-movado en 2014/NAKAMITI Tamihiro* は日本大会やてよう大会の成功例を分析。対訳「一房の葡萄/有島武雄:TRAD.OKI Keimei」連載中。*Vortaro por Lernantoj* は *Laŭlum*(李士俊)の遺稿だがすでに連載 150 回。単語の意味を文と 4 行詩で説明するもの。2 月号から続いてタニヒロユキさん追悼文が 5 編。

* *NOVA VOJO* :N-ro 515 marto 2015, EPA(エスペラント普及会)、A5X34 頁のうち E.文 6 頁。巻頭言「悲惨な状況にある世界に希望のともしびを」の筆者は 1 月まで北海道に出向していた田中雅道 EPA 専務理事。「UK の 100 年-ちょっと小路へ」は「第 1 回世界大会のころ」連載 3 回目。

(el la 11a pĝ: 114-シヨリ)

krateron unu post alia en la montsupra vulkana planko, oni nomis ilin laŭ la alfabeto de A al N. Pro moviĝado de grundo, ĉi tie okazis multaj fendegoj. Post la erupcioj disfaloj de krutaĵoj de Nova Monto Usu kaj rokoj kaj koto forfluitaj de pluvoj plenisgis la kraterojn kaj fendegojn. Nun el inter fendoj de rokoj ŝprucas gaso en alta temperaturo. La gaso konsistas ĉefe el akva vaporo kaj enhavas sulfuran dioksidon SO₂, kiu estas venena kontraŭ la homa korpo. Pro tio estas limigite eniri la montsuprajn kraterojn.

(Fino)

La 6-a Internacia Esperanto-Festivalo en Zaozhuang

Sawaya YQiti

(Noto de la redaktanto)

昨年の北海道大会の後で韓国からの Suno さんと同行の我々を洞爺湖・有珠山に案内してくれた伊達市の澤谷雄一さんの投稿です。中国山東省 枣庄 (Zaozhuang) 市で今年10月に行われる国際エスペラント祭の予告。

この枣庄 (発音は Zao^oguang に近い) 市の大学にはエスペラント博物館がありもと埼玉大学教授の佐々木照央さんのエスペラント講座もあります。

Lastatempe mia ĉina amiko en Zaozhuang, Shandong-provinco, sendis al mi informilon pri <la 6a Internacia Esperanto-Festivalo> en Zaozhuang. Lastatempe Zaozhuang estas fame konata en la monda Esperantujo pro la fondo de Esperanto-Muzeo en la Universitato Zaozhuang, kie prof. Sasaki Teruhiro instruas Esperanton kaj la japanan lingvon. (Vi povas vidi videon pri la Esperanto-Muzeo: <http://www.ikef.org/nova309oj/esperanto-muzeo-en-zaozhuang-a-universitato-inio>)

Kaj ankaŭ en la alia nova kaj granda Profesia Instituto de Zaozhuang, kie lernas pli ol 10 000 studentoj, Esperanto estas instruita al studentoj en postlecionara Esperanto-kurso. Mi vizitis la urbon kaj la instituton en 2010 kaj renkontigis kun la tieaj aktivaj esperantistoj. http://www.espero.com.cn/2014-10/17/content_33792270.htm#. VEX4wmRpfhc. facebook

Jen estas la informilo pri la Esperanto-Festivalo.

***** ***** *****

La 6-a Internacia Esperanto-Festivalo en Zaozhuang, Shandong-provinco, Ĉinio, 23-25a de oktobro, 2015

Organizantoj: Zaozhuang-a Esperanto-Asocio kaj Zaozhuang-a Profesia Instituto

Dato: 23-25a de oktobro, 2015

Loko: Zaozhuang-a Profesia Instituto

Temo: Vojaĝo de la suda kulturo de Shandong-provinco

Kotizo: 660 ¥ (120 \$)

Programeroj:

La 22a: Tuttaga alveno

18:00: Vespemango kaj interkona vespero

La 23a:

Antaŭtagmezo:

1. Inaŭguro

2. Vizito al Esperanto-Muzeo

3. Vizito al la statuo de Zamenhof

Posttagmezo: Vizito al Zaozhuang-a Internacia E-Arbaro, plantado kaj fruktoŝirado

Vespero: Interŝanĝoj de esperantistoj

(al la 16a paĝo: 16^ハ-ジ^ハ)

Protokolo de la 3-a Komitato Kunsido de HEL/Kasjaro 2015 2015年度 第3回北海道エスペラント連盟委員会 議事録

日時：2015年1月25日（日） 13:00～15:30

場所：札幌エルプラザ2階 会議コーナー

出席者：横山、後藤（義）、後藤（純）、阿部、星田、川合（記録）

【組織】

- ・新規加入者：なし。
- ・退会者：なし。
- ・ご逝去：中田実さん（2014年12月）。「Heroldo de HEL」第157号に後藤（義）委員によるお悔やみのメッセージ同封。
- ・未納者：機関誌に振込用紙同封。

【財政】

- ・昨年立てた予算案どおり執行中だが、今後の活動内容いかんによっては、事務局長預かりの預金（100万円）を取り崩す可能性もある（阿部）。

【広報】

- ・HP：アクセス数71 829件（2ヶ月前より+367）になった。各種行事の報告を載せている。「Heroldo de HEL」のPDF化完了。現在、「Leontodo」をPDF化中。また、北海道のE運動史についてもPDF化の予定（横山）。
- ・メールマガジン：1月25日、419部発行。発行部数は微減している（横山）。

【教育・研究】

- ・SES：月曜例会では次のテキストに『Flugorango Rakontas』を検討中（阿部）。土曜例会では『華岡青洲の妻』がまもなく終わり、あと3～4週で『Homoj de Putin』に入る（後藤（純））。
- ・70代男性1名、個人教授に通って来ている（後藤（義））。
- ・TES：『サロメ』を読んでいる。入門の学習をしていた人（1名）は私事都合で来なくなった（星田）。

【機関誌】

- ・1月25日、「Heroldo de HEL」第157号（20頁）、90部印刷・発行。E文での投稿が多くなった。次号には連載3回目のE文記事も載ることになる（星田）。
- ・次号は次回委員会時発行。

【年間計画】

- 【初夏合宿】日程の候補は1)6月13～14日、2)6月27～28日。星田委員より柴田内科循環器科研修センターの柴田氏に問合せ。ブラジルからgastoがあるかもしれない（未確定）。
- 【北海道大会】日程は10月17～18日と決定。かでの2.7の部屋（定員40人）を予約する（阿部委員）。講師候補はアレクサンドラ綿貫氏、ge-s-roj Kleman。星田委員より打診。

【次回委員会】

2015年3月15日（日）13時より。場所はエルプラザ2階市民活動サポートセンター 会議コーナー（18人用）。同日10時より機関誌の印刷を行う。

Datingo de p. 14
(14 ページからつづく)

La 24a:

Antaŭtagmezo: Veturo al urbo Tengzhou kaj vizito al Mozia Muzeo

Posttagmezo: Veturo al Qufu kaj vizito al la hejmo, templo kaj arbaro de Konfuzio

Vespero: Interŝanĝoj de esperantistoj

La 25a:

Antaŭtagmezo:

1. Prezentado de ĉinaj te-arto, papertranĉaĵo, skulptaĵo el argilo, novjaraj bildoj ktp

2. Fermo

Klarigoj de kotizo: La pago inkluzivas loĝadon (dulita ĉambro), manĝojn kaj biletojn de vidindaĵoj ekde la vespero de la 22a ĝis la tagmezo de la 25a kaj veturoj dum la festivalo. Apartaj pladoj por vegetaranoj.

Kontaktu kun : Sinjoro LIU Baoguo verdakoro@163.com

[編集後記 / Redaktanto parolas]

*連載3回に及んだ沢谷さんと OMOさんの大作はこの号で終わります。員組みの都合で次の号に回った原稿も一つ。

*もう一つ、次号回しはロシアからの投稿。ネットやメールに縁がないどころかタイプライターもないようで手書きの原稿。わづかな障害者給付でかろうじて生活しているというハバロフスクの Korĉmarjov さん。読み取れない字を問い合わせるにも手紙では返事が来るまで2か月です。早く発表できる形にしたいのですが。

*「よみがえれ、えりもの森」の UEA機関誌の記事には驚きました。HEL の活動について1頁にわたる記事は初めてでしょう。「自然保護」の分野についてのことだが、世界の関心にこたえる作品を送ることができた、と思います。次は何を？ 考えましょう。

北海道エスペラント連盟	会費/年	
正会員	3000円、	青年会員 (26歳未満) 1500円、
購読会員	2000円、	家族会員、失業者など割引 1000円

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

*Redaktas la Organa Fako de HEL

c'e HOS'IDA Acus'i

Miyanomori 2-18-18, TOMAKOMAI

053-0844 JAPANIO

TEL-FAKS: 0144-74-2539

Retadreso: hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp

*Sekretario: KAWAI Yuka

N-ro 100, Simin-Katudo-Sapoto-Senta

Sapporo L-Plaza 2F, Kita 8 Nisi 3

Kita-ku, Sapporo, 060-0808 Japanio

TEL-FAKS: 0126-35-7153

Retadreo: kunespere@olive.plala.or.jp

*TTT-ejo : <http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/index/index-j.htm>

*Pos'tg'irkonto (郵便振替) : 02700-6-17075

北海道エスペラント連盟

*編集: 連盟機関誌部

〒053-0844 苫小牧市

宮の森町2丁目18-18

星田 淳 方

*事務局: 川合由香

〒060-0808 札幌市北区

北8条西3丁目札幌エルプラザ

市民活動サポートセンター レターケースNo.100